Esperantologio / Esperanto Studies, 4
DOI: 10.59718/ees73284

Esperantologio / Esperanto Studies **4** (2009), 93–102

Historio kaj planoj de nova Esperanto-Muzeo en Svitavy

Petr Chrdle

Resumo. La Esperanto-Muzeo en la ĉeĥa urbo Svitavy estis inaŭgurita en septembro 2008. Ĝi enhavas daŭran ekspoziciejon. Ĝiaj komputilbazita informpanelo kun tuŝekrano kaj laborloko kun daŭre kreskanta datenbazo en komputilo, kiuj estas je la dispono de vizitantoj, proponas ankaŭ efikan studadon de la historio kaj nuna stato de Esperanto kaj esperantologio. La artikolo priskribas la historion de la muzeo, ĝian nunan staton kaj ankaŭ planojn por la estonteco.

Souhrn. *Historie a plány nového muzea esperanta ve Svitavách*
Muzeum esperanta v českém městě Svitavy bylo otevřeno v září 2008. Má stálou výstavní síň. Jeho informační panel s dotykovou obrazovkou a trvale se rozšiřující databáze v počítači přístupném návštěvníkům nabízejí také efektivní studium historie i současného stavu esperanta a esperantologie. Článek popisuje historii muzea, jeho současný stav a také jeho plány do budoucna.

Abstract. *History and plans for the Esperanto Museum in Svitavy.*
The Esperanto Museum in the Czech town of Svitavy was inaugurated in September 2008. It has a permanent exhibition hall. Its computer-based information panel with touch screen and an expanding computer database available to visitors also offer an effective study of the history and current state of Esperanto and Esperantology. The article describes the history of the museum, its current status and plans for the future.

Zusammenfassung. *Geschichte und Planung für das Esperanto-Museum in Svitavy.*
Das Esperanto-Museum in der tschechischen Stadt Svitavy wurde im September 2008 eingeweiht. Es enthält einen Raum für Dauerexponate. Eine computergestützte Informationswand mit Touchscreen und ein Computerarbeitsplatz mit ständig wachsender Datenbank bieten den Besuchern beste Möglichkeiten, Geschichte und heutigen Stand von Esperanto und Esperantologie zu studieren. Der Artikel beschreibt die Geschichte des Museums, seinen jetzigen Zustand und Planungen für die Zukunft.

Резюме. История и планы Эсперанто-музея в Свитавы.
Эсперанто-музей в чешком городе Свитавы был открыт в сентябре 2008 года. В нём есть постоянный выставочный зал. Посетители могут изучать прошлое и настоящее Эсперанто и эсперантологии. Это бозможно благодаря сенсоровной панели и рабочему месту с доступом к постоянно растущей базе данных. Статья описывает историю музея, его текущее состояние и планы на будущее.

Résumé. *Histoire et plans pour le musée Espéranto à Svitavy.*
Le musée Espéranto de la ville tchèque de Svitavy a été inauguré en septembre 2008. Il contient une salle d'exposition permanente. Son tableau d'information avec écran tactile et une place de travail avec ordinateur contenant une base de données en croissance continue et qui est à la disposition des visiteurs propose aussi une étude effective de l'histoire et de l'état actuel de l'espéranto et de l'espérantologie. L'article décrit l'histoire du musée, son état actuel et aussi des plans pour le futur.

La jaro 1989 komplete ŝanĝis ne nur la politikan kaj ekonomian sistemon en Ĉeĥoslovakio saltante en kapitalisman merkatan sistemon, sed memkomprene ankaŭ la vivon de ordinaraj homoj kaj de ĉiuj neprofitdonaj organizaĵoj kaj iliaj aktivecoj. Tie mi do devas komenci, se mi volas klarigi la historion de la nova Esperanto-Muzeo.

Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la jaro 1989 havis pli ol 3000 membrojn kaj malgraŭ tio, ke ĝi ne ricevadis regule monon por sia aktiveco de la ŝtato (kiel en kelkaj aliaj socialismaj landoj), la membrokotizo sufiĉis por havi luitan duĉambran oficejon centre de Prago, en kiu troviĝis ankaŭ arĥivo kaj libroservo. Krome la jure memstara Praga klubo posedis proksime ankaŭ duĉambran klubejon, en kiu estis lokita inter alie la biblioteko Jaroslav Šustr enhavanta 5 800 volumojn.

Post la jam menciita politika kaj ekonomia ŝanĝo oni devis tre rapide forlasi kaj la asocian oficejon, kaj la klubejon de la Praga klubo, pro la rapida influo de la merkata sistemo, kiu pli ol dudekobligis la luprezojn. Ekestis do kelkjara periodo, kiam ni, ĉiuj funkciuloj, anstataŭ zorgi pri la evoluo de la Esperanto-movado en Ĉeĥio devis strebi savi tion kio estis savebla por ekonomie travivi. Krom tio ekregis plia neatendita fenomeno: anstataŭ levo de intereso pri la neŭtrala komunikilo Esperanto, la nombro de la membroj de ĈEA komencis rapide fali, precipe de la mezaĝuloj. Ili komencis laboregi por mono kaj ĉiuj kiuj bezonis dume komuniki internacie eklernis la anglan, kio estis kaj plu estas konsiderata pli racia agado ol dediĉi tempon al Esperanto – kaj eĉ pagi kotizojn al Esperanto-Asocio. Do ne nur multobliĝis la elspezoj; samtempe malkreskis konsiderinde la enspezoj de ĈEA.

Feliĉe, danke al la agado de Jiří Pištora, tiama direktoro de la Urba Muzeo kaj vicurbestro de la urbo Česká Třebová, eblis fondi Esperanto-fakon de la Urba Muzeo en tiu urbo kaj almenaŭ la materialoj (precipe arĥivaĵoj kaj la biblioteko Jaroslav Šustr) estis savitaj. La kontrakto inter ĈEA kaj la muzeo antaŭvidis ne nur la deponon de la esperantaĵoj, sed ankaŭ porokazajn ekspoziciojn. Ekde tiam do ekzistas Esperanto-fako ĉe la Urba Muzeo en Česká Třebová. Tamen, pro manko de spaco neniam ĝis nun efektive okazis publika ekspozicio; do ĝi fakte servas la tutan tempon kiel deponejo. Memkomprene, ankaŭ tio tre gravas por ke la aĵoj ne perdiĝu, sed nia celo estis multe pli ambicia – ni ja revis pri tio, ke la biblioteko denove funkciu por membroj, kaj pri vera muzeo kun daŭra esperanto-ekspoziciejo. Ja inter transdonitaj aĵoj estis ankaŭ kelkaj unikaĵoj, inter ili ekzemple granda busto de L. Zamenhof fare de la renoma ĉeĥa skulptisto Emanuel Kodet, produktita plej verŝajne okaze de la 13-a kongreso de Esperanto en Prago en la jaro 1921.

Dum postaj jaroj ĈEA denove ricevis plurajn valorajn donacojn plejparte de siaj membroj, krome restis al ĝi alia libroteko, origine scienc-teknika, intertempe parte kompletigita ankaŭ pri beletro. Tial la ĈEA-komitato decidis serĉi alian lokon, kie eblus ekhavi veran esperanto-muzeon, fokusitan precipe al la esperanto-agado en Ĉeĥio, kaj ĉefe, kiu povus havi, eĉ se modestan, tamen daŭran esperanto-ekspoziciejon.

La fondo de la Esperanto-Muzeo

Kaj ni havis bonŝancon. La tiama ĈEA-komitatanino Libuše Dvořáková el la distrikta urbo Svitavy (situanta sur la limo de la historiaj landoj Bohemio kaj Moravio kun norda latitudo 49°20′ kaj orienta longitudo 16°28′) informis la komitaton, ke en Svitavy oni konstruas novan modernan kulturan domon, kaj ke post ĝia ekfunkcio restos pluraj salonoj en antaŭaj kulturaj instalaĵoj liberaj – kaj, kio gravis, ke la urbo ankoraŭ ne havas klaran imagon por kiu celo ili servu. Ŝi do ricevis la taskon ektrakti kun la direktorino de la Urba Muzeo kaj kun la urbaj instancoj, ĉu ne povus unu el ili transformiĝi al esperanto-muzeo.

Ŝi sukcesis veki intereson kaj ĉe la direktorino de la Urba Muzeo Blanka Čuhelová, kaj ĉe la urbaj instancoj frunte de la urbestro Jiří Brýdl. Tiu eĉ konsilis al ni kiel peti monon de la Ministerio pri kulturo por tiu celo. Li mem intervenis kaj ni mirakle ricevis la tutan petitan sumon. Paradokse, tio komplikis la aferon pro la ministeria kondiĉo ke la subvencio kovru maksimume 70 % de la tuta kosto de la projekto. Ni do ne kuraĝis ekuzi ĝin pro manko de la restantaj 30 %. Malgraŭ la financa helpo de la urbo kaj de ĈEA laŭ siaj modestaj ebloj, restis nesufiĉe. Finfine, donaco de la mankanta monsumo

flanke de la Esperantic Studies Foundation savis la aferon, kaj danke al ĝi la rekonstruo de la salono de la Esperanto-Muzeo povis okazi.

La solena inaŭguro

La solenan malfermon de la muzeo la 20-an de septembro 2008 komencigis la Esperanto-himno. Ĉeestis pluraj honoraj gastoj, eĉ membro de la Senato (la supra ĉambro de la ĉeĥa parlamento), la urbestro de Svitavy, kaj ankaŭ la direktoro de la Esperanto-Muzeo en Vieno Herbert Mayer kaj la gvidanto de la kolekto "Esperanto – Marie Hankel" en la Teknika Universitato en Dresdeno Wolfgang Schwarz. La solenan etoson substrekis mallonga koncerto de kantoj en Esperanto plenumitaj de Elena Puchova kaj Dmitrij Dovĵik, kiuj kolektis grandan aplaŭdon. Entute partoprenis la solenan malfermon 146 ĉeestantoj.

Post la tosto je sukcesplena estonteco de la muzeo la urbestro Jiří Brýdl kune kun la prezidantino de ĈEA Jana Melichárková tratondis la rubandon, la Esperanto-Muzeon eniris la unuaj vizitantoj, inter ili ankaŭ redaktoroj de amaskomunikiloj, kiuj uzis la okazon por intervjui kelkajn funkciulojn de ĈEA kaj partoprenantojn (eĉ esperantistinon el Meksikio, kiu bonŝance estis en Ĉeĥio). Tre pozitivan dokument-filmon pri la malfermo de la muzeo dissendis regiona televidstacio. Kaj la muzeo komencis enskribi sian historion.

La muzeo mem kaj ĝia agado

Ni ricevis je dispono por la Esperanto-Muzeo belegan salonon en unu el la plej belaspektaj historiaj konstruaĵoj en Svitavy, la Ottendorfer-biblioteko. Ĝi portas la nomon de la mecenato V. O. Ottendorfer (1826–1900), kiu ĝin konstruigis en 1892, kaj de ĝia origina funkcio kiel biblioteko. Cetere, siatempe ĝi posedis la plej ampleksan kolekton de germanlingvaj libroj en Moravio (22 000 volumoj). Nun en la supra etaĝo troviĝas belaspekta koncerthalo kun perfekta akustiko, sube la Esperanto-Muzeo kaj agrabla te-trinkejo.

La muzeo mem konsistas el du partoj: la unua, pli granda, servas kiel ekspoziciejo. En ĝi estas 13 surmuraj informpaneloj, 5 tablovitrinoj kaj vico de vitroŝrankoj. En ĉio ĉi la unua ekspozicio prezentis al vizitantoj bazajn konojn pri Esperanto (kaj la lingvo, kaj la vivo ĉirkaŭ ĝi), de la projektoj de internaciaj lingvoj antaŭ Zamenhof ĝis la nuntempa Esperanto-vivo. Tamen, du informtabuloj kaj unu vitrino estis dediĉitaj al la historio de la loka Esperanto-klubo, kiu ĝuste en 2008 festis sian 75-jariĝon.

La unua ekspozicio daŭris 6 monatojn, kaj do fine de marto 2009 estis inaŭgurita jam dua ekspozicio, kiu havas du partojn: la celo de la unua estas omaĝi la kvardekjariĝon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, tamen kun montro ankaŭ

de la Esperanto-movado antaŭ ĝia fondiĝo; la dua prezentas la junularan Esperanto-movadon kun emfazo sur la Internacia Junulara Kongreso, kiu ĝuste ĉi-jare okazas en la ĉeĥa urbo Liberec, unuan fojon en la historio de IJK sur la teritorio de Ĉeĥio.

Malgraŭ la decido, ke ĉiuj ekspozicioj daŭros po 6 monatojn, estas kelkaj eksponatoj, kiuj restas daŭre: centre de la muzeo estas lokita la jam menciita granda busto de Zamenhof, pruntepreniita de la Esperanto-kolekto de la Urba Muzeo en Česká Třebová. Kiel pliajn daŭre ekspoziciatajn unikaĵojn mi menĉiu almenaŭ la tutan jarkolekton 1912 de la japana kolora mane bindita ĉiumonata internacia gazeto *Orienta Azio*, donacita de filo de la abonanto, kaj la originalon de la unua lernolibro de Esperanto en la ĉeĥa fare de F. V. Lorenz, kiu aperis en 1890, do nur tri jarojn post la apero de la unua lernolibro de Esperanto fare de Zamenhof.

La dua, nepublika parto de la muzeo servas kiel deponejo de ĈEA. En ĝi troviĝas precipe la ĈEA-biblioteko kaj la diversspecaj esperantaĵoj ne momente ekspoziciataj. Ĝi estas provizita per labortablo kun komputilo por la volontulaj prizorgantoj de la muzeo.

Kvankam ekspozicioj estas sendube esenca parto de ĉiu muzeo, la Esperanto-Muzeo en Svitavy strebas dekomence esti multe pli ol nura ekspoziciejo kaj deponejo por esperantaĵoj. Ĝi devus servi kiel esplorejo kaj edukejo. Tial jam dekomence estas tie je dispono komputilbazita informpanelo kun tuŝekrano, helpe de kiu oni povas konatiĝi kun fundamentoj de Esperanto, ĝia gramatiko, sed ankaŭ ĝiaj kulturo kaj realaĵoj, kaj ankaŭ ĝui la lingvon aŭde, aŭskultante kaj deklamatan tekston, kaj kantadon. Krome estas en la muzeo studloko provizita per komputilo, kiu enhavas multajn utilajn datenojn, ekzemple grandan elektronikan ĉeĥan-esperantan kaj esperantan-ĉeĥan vortaron, kaj baldaŭ ĝi enhavos ankaŭ kompletan liston de Esperanto-libroj disponeblaj.

Plia agrabla afero por la esplorantoj kaj studantoj estas, ke en la konstruaĵo mem eblas favorpreze tranokti, ĉar subtegmente troviĝas tri gastĉambroj apartenantaj al la Urba Muzeo.

Mi aldonu, ke la ĉefa konstruaĵo de la Urba Muzeo kaj galerio situas en najbareco de la Esperanto-Muzeo kaj ĝi enhavas du daŭrajn ekspoziciojn: pri la plej konata naskito el Svitavy kaj savinto de centoj da judoj Oskar Schindler (1908–1974) kaj pri tolaĵlavado kaj lavmaŝinoj. Do la Esperanto-Muzeo montras ekde nun la trian temon, kun kiu oni povas konatiĝi en Svitavy.

La Esperanto-Muzeo jam dum mallonga tempo de sia ekzisto sukcesis konsiderinde levi la konscion pri Esperanto en la regiono: feliĉe tuj dimanĉe la 21-an de septembro, do la tagon post la solena malfermo, okazis en Svitavy "Tago de malfermitaj pordoj", dum kiu ĉiuj muzeoj, turismaj vidindaĵoj,

preĝejoj, k.t.p., estis malfermitaj kaj senpage viziteblaj. Tio altiris ankaŭ sufiĉe da publiko en la novmalfermitan muzeon. Ĉar mi parte ĉeestis, mi povas atesti, ke la reago de la publiko estis preskaŭ ĉiam mirige pozitiva.

Kaj surprize, oni invitis min prelegi en Svitavy la 25-an kaj 26-an de novembro: pri projektoj de artefaritaj lingvoj, do plejparte pri Esperanto. Mi prelegis por gimnazianoj, poste en la Esperanto-Muzeo mem por la publiko kaj fine atendis min eĉ trihora (kvarleciona) kurso en la Universitato de la tria ago. Sendube ankaŭ tio estis rezulto de la malfermo de la nova Esperanto-Muzeo.

Sed okazis en la Esperanto-Muzeo jam pliaj aranĝoj por publiko, kiuj altiras flanke intereson pri Esperanto. Kiel ekzemplon mi menciu "Marcipanan Kristnaskon", dum kiu esperantisto, profesia produktanto de diversspecaj marcipanoj, prezentis sian arton kaj eĉ instruis tion al interesatoj, sed okazis tie ankaŭ infanaj renkontiĝoj kaj simile.

La 13-an de junio la unuan fojon partoprenas la Esperanto-Muzeo la "Muzean nokton". Por tio ni preparis diversajn allogaĵojn, inter ili koncerton de Jan Duda, esperantisto kaj membro de ŝtata filharmonio, kaj mallongajn kursojn de Esperanto por interesatoj kiujn mi gvidos.

Planoj por la estonteco

Malgraŭ tio, ke la Esperanto-Muzeo nur komencis sian ĝis nun mallongan historion, oni jam atente planas kaj preparas sekvajn ekspoziciojn. La nuna dua ekspozicio daŭros ĝis la ĈEA-konferenco, kiu okazos en Svitavy de la 9-a ĝis la 11-a de oktobro 2009. Jam estas ankaŭ decido pri la tria ekspozicio denove enhavanta du temojn. La unua estos "Esperanto kaj Fervojo" omaĝe al la centjariĝo de la Esperanto-movado inter fervojistoj, en kiu ankaŭ ĉeĥaj samideanoj ludis signifoplenan rolon, kaj la dua "Esperanto kaj infanoj" (ambaŭ estas ĝis nun labortitoloj). Por ĝi ni jam anoncis Internacian konkurson de infandesegnaĵoj kun la temo "Fervojo". Memkomprene la plej sukcesaj infanaj artaĵoj estos ekspoziciataj. Kaj en la kapoj de la membroj de muzeogrupo de ĈEA jam estas eĉ pliaj interesaj temoj por pli postaj ekspozicioj, sed estas nun tro frue publikigi ilin.

Estis jam eldonita informriĉa propagandilo pri la muzeo en Esperanto kaj en la ĉeĥa, angla, germana kaj rusa lingvoj. Ili estas en la formo de papera faldfolio kaj krome en pdf-formato en la retpaĝo de la muzeo

`www.muzeum.esperanto.cz`

Tiun retpaĝon, kiu enhavas la bazajn informojn pri la muzeo, oni planas daŭre kompletigi, inter alie per pliaj lingvaj versioj de la faldfolio. Al la Esperanto-Muzeo estas dediĉita kompleta paĝo en alia faldfolio pri la Ottendorfer-domo,

kiun eldonis la Urba Muzeo. Kaj la oficiala retpaĝaro de Svitavy nun enhavas version en Esperanto.

Fine mi volas substreki, ke la estonteco certe dependas iugrade ankaŭ de la ceteraj, ĉefe eksterlandaj esperantistoj. Ja ke la Esperanto-Muzeo restu vere daŭra, necesas konvinki la urbajn instancojn, ke ĝi efektive levas la konscion pri la urbo Svitavy en la mondo kaj helpas altiri ankaŭ intereson de estontaj vizitantoj. Tial ankaŭ ni organizas en Svitavy laŭeble Esperanto-aranĝojn, ekzemple ĉi-jare ekoturisman renkontiĝon dum la lasta aŭgusta semajno (kiun organizas KAVA-PECH kunlabore kun la Asocio de Verdaj Esperantistoj) kaj Konferencon de Ĉeĥa Esperanta-Asocio en oktobro.

Por tiuj, kiuj volas helpi per ajna mesaĝo (gratulo, montro de intereso, demando pri iu realaĵo de la ĉirkaŭaĵo kaj simile, bonvolu uzi prefere ambaŭ jenajn retadresojn:

⟨`muzeo@esperanto.cz`⟩ (rekte en la komputilon de gvidanto de la muzea grupo de ĈEA Jiří Tomeček) kaj

⟨`esperanto@muzeum.svitavy.cz`⟩ (rekte en la komputilon de la direktorino de la Urba Muzeo en Svitavy, Blanka Čuhelová).

La paperkoresponda adreso estas:
Esperanto-Muzeo, Máchova alej 1, CZ-568 02 Svitavy;
la TTT-ejo havas la adreson `www.muzeum.esperanto.cz`

Pri la aŭtoro

Petr Chrdle, naskiĝinta en 1946, origine inĝeniero pri elektrotekniko, doktoriĝis ĉe la Instituto pri radioelektroniko kaj elektroniko en Prago kaj ĝis 1992 laboris ĉe la Fervoja Esplorinstitito kaj instruis en la Teknika universitato de Prago kaj la Trafika Universitato Žilina (filio Prago). En 1992 li fondis la Kongresan kaj klerigan agentejon KAVA-PECH kaj samnoman eldonejon. Dum la jaroj 1990–1994 li estis senata sekretario de AIS San Marino, de 1987 ĝis nun komitatano de UEA, de 1998 ĝis 2001 ĝia estrarano pri faka kaj scienca agadoj, kaj 1987–1993 prezidanto de ĈEA; ekde tiam ĝia vicprezidanto. Ekde 1997 li membras en la ekzamena komisiono de ILEI. Li aŭtoris lernolibron de esperanto por ĉeĥoj (jam la 3-a eldono aperis). En la broŝuro *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj* li resumis siajn spertojn en tiu kampo.

Adreso de la aŭtoro:
Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice,
⟨`chrdle@kava-pech.cz`⟩, `www.kava-pech.cz/esperanto`

Ricevita 2009-05-11. Akceptita 2009-06-21

La bildojn sur la sekvantaj paĝoj fotis la aŭtoro.

La salono en la Esperanto-Muzeo kun la busto de Zamenhof

La inaŭguro de la Esperanto-Muzeo en Svitavy 2008-09-20. En antaŭo de maldekstre Wolfgang Schwarz, Herbert Mayer, Jiří Pištora kaj Anna Pištorová

La Ottendorfer-biblioteko en Svitavy kun la Esperanto-Muzeo